

Fenikso

Revuo de Esperanto Nederland

Jarkolekto 30 - n-ro 3



majo - junio 2025



Nederlando

Manĝi tre bone, ridi kaj lerni tre multe. Pri la studosemajnfino

8

Nederlando

Nanne Kalma kaj Ankie van der Meer premiitaj

10

Nederlando

Loes Demmendaal: Mia mondo estas pli larĝa dank' al Esperanto

12

Fenikso

Revuo de
Esperanto Nederland

Dumonata membrogazeto de Esperanto Nederland

ISSN 1384 - 6515



Membroj de Esperanto Nederland ricevas la gazeton. La jara kotizo estas €40,- por membroj pli ol 30-jaraj, €15,- por membroj ĝis 30-jaraj kaj €15,- por samhejmano.

Vidhandikapitoj povas ricevi kasedan version, aranĝitan de Rob Moerbeek. Petu abonon ĉe

✉ redakcio@esperanto-nederland.nl

Kunlaborantoj de Fenikso

Ĉefredaktoro: Paweł Fischer-Kotowski

Redaktoroj: Thijs van Viegen, Paweł Fischer-Kotowski

Korektantoj: Bert de Wit, Inge Demmendaal

Konsilanto: Ineke Emmelkamp

Limdato: Materialo por la sekva numero estas bonvena ĝis la **10-a de septembro 2025**.

Informoj pri Esperanto

Ineke Emmelkamp

📍 Arubastraat 12, 9715 RW Groningen

✉ info@esperanto-nederland.nl

☎ 050 571 88 42

Studosemajnfino/studieweekend

✉ studosemajnfino@esperanto-nederland.nl

Esperanto Nederland enrete

🌐 <https://www.esperanto-nederland.nl>

📘 <https://facebook.com/esperanto.nederland>

📺 <https://t.me/EsperantoNederland>

✂ <https://twitter.com/EsperantoNL>

Sendu viajn kontribuojn al

✉ redakcio@esperanto-nederland.nl

Respondu al artikoloj per maksimume 200 vortoj.

La redakcio decidas pri la publikigo de la tekstoj.

Estraro

✉ estraro@esperanto-nederland.nl

Prezidanto: Marc van Oostendorp

Nederlandse Taal en Cultuur

Radboud Universiteit Nijmegen

📍 Postbus 9103 6500 HD Nijmegen

✉ prezidanto@esperanto-nederland.nl

Sekretario: Rob Groeneveld

📍 Scharounlijn 44, 2728 BT Zoetermeer

☎ 06 19 77 35 27

✉ sekretario@esperanto-nederland.nl

Kasisto: Kees Neeft

📍 Van Alphenplein 84, 2353 CN Leiderdorp

✉ kasisto@esperanto-nederland.nl

Estrarano: Peter van Noorden

📍 Tamarixplantsoen 203, 1702 JD Heerhugowaard

✉ petervn@esperanto-nederland.nl

☎ 06 22 61 32 49

Estrarano: Ineke Emmelkamp

📍 Arubastraat 12, 9715 RW Groningen

✉ informado@esperanto-nederland.nl

Membro-administranto: Koos Scharroo

📍 Vaartweg 24G, 8382 EB Frederiksoord

✉ membroj@esperanto-nederland.nl

☎ 06 22 41 32 67

Ekz. informi pri (ŝanĝoj de) poŝtadreso, telefonnumero, retpoŝtadreso, (eks- kaj ali)membriĝo, pagmaniero ktp.

Pri sociaj komunikiloj

sociaj-komunikiloj@esperanto-nederland.nl

Bankkonto:

IBAN: NL 10 TRIO 0786 8441 67

Nome de Esperanto Nederland

Eventuala resendadreso/eventueel retouradres:

Esperanto Nederland Ledenadministratie

📍 Vaartweg 24G, 8382 EB Frederiksoord

En la numero

Nederlando

Nederlandse Esperanto-Jongeren
Raporto pri la studosemajnfino
Premio Verloren van Themaat
Raporto el la jarkunveno
Intervjuo kun Loes Demmendaal

Internacie

Interasocia Kongreso en Francio
Artikolo el *de Volkskrant*

Ceteraĵoj


Revuo-Interŝanĝo
Du svingiloj



10



8



12



16



17

Sur la kovrilpaĝo

Bildo: Ineke Emmelkamp

En aprilo ĉi-jare okazis nova studosemajnfino. Raporto pri la semajnfino verkita de Mariska de Jong estas trovebla sur **paĝo 8**. Dum la lecionoj, grupo de partoprenantoj en supera nivelo verkis poemon sub la titolo *Vere tamen*, ĝi troviĝas tuj apude, sur **paĝo 9**.

Voorwoord

5

6

8

10

11

12

14

14

15

16

16

17

Dit is alweer de derde *Fenikso* van 2025. Wat gaat de tijd toch snel...

Dit nummer van *Fenikso* bevat weer veel nieuws en interessante artikelen. Bijvoorbeeld informatie over de toenemende activiteiten van de Nederlandse Esperanto-Jongeren (NEJ). Dit jaar organiseren ze in november een nieuwe editie van KKPS. Kijk voor meer informatie daarover op **pagina 6**.

In april vond weer een studieweekend plaats in Krikkenhaar. Een kort verslag en een gedicht dat tijdens het weekend geschreven is, vind je op **pagina's 8 en 9**.

In deze *Fenikso* vind je verslag van de jaarbijeenkomst van Esperanto Nederland op 10 mei, met daarnaast een artikel over de uitreiking van de Verloren van Themaat-prijs aan Nanne Kalma en Ankie van der Meer. Zie daarvoor **pagina's 10 en 11**.

Loes Demmendaal gaat stoppen als bestuurslid van Esperanto Nederland. Paweł interviewde haar over haar inzet voor het Esperanto en haar band met de taal (zie **pagina's 12 en 13**).

Ron Winteraeken reisde af naar Nantes voor het *Interasocia Kongreso de Esperanto*. Meer over deze inspirerende bijeenkomst vind je op **pagina 14**.

De Volkskrant publiceerde recent een artikel van Marc van Oostendorp over waarom Trump nieuwe argumenten geeft voor het gebruiken en verspreiden van Esperanto als neutrale taal. Zie **pagina 15**.

Zoals in andere nummers vind je ook in deze *Fenikso* de vaste rubriek *Revuo-Interŝanĝo* (**pagina 16**). Op **pagina 17** vind je een leerzaam artikel over twee schommels. Verder zijn er een nieuwe puzzel (**pagina 18**) en een nieuwe *La Komencinto* (**pagina 19**).

Paweł en Thijs

De la estraro

La estraro kunvenis la 1-an de februaro en De Kargadoor en Utrecht. Tio estis la lasta ĉeesta kunveno en 2025. Plue la estraro kunsidos per Zoom. La estraro preparis la jarkunvenon diskutante la tagordon kaj decidis pri la atribuo de la Verloren van Themaat-premio. La rezultkonto pri 2024 montris malgrandan profiton, kontraste al la antaŭaj jaroj. Tio ne nepre ripetigos dum la venontaj jaroj. Pluraj donacoj plibonigis la financon staton de la asocio. La kostoj por la retejo estos pli altaj en 2026, ĉar ni profitas de rabato en la unua jaro (2025) ĉe la nova liveranto (*internet provider*). Nia asocio fariĝos peranto por la revuo *Monato* ekde 2026. La Kultura Tago estis pridiskutata kaj la programo aspektas bona. La sekretario sendis retmesaĝon al la membroj la 24-an de majo, instigante ilin aliĝi al la Kultura Tago.

La estraro kunvenis la 6-an de marto. Montriĝis la neceso reelekti du membrojn de la Arbitracia Komisiono; tio mankis en la proponita tagordo de la jarkunveno.

Artikolo de Marc van Oostendorp pri la lingva problemoj kiun solvas Esperanto aperis en *de Volkskrant*. Libera Folio publikigis la Esperantan tradukon de la artikolo, faritan de Marc mem.

Ineke Emmelkamp prezentis la 3-an de marto Esperanto Nederland en prelego al membroj de Serbia Esperanto-Ligo (SEL), laŭ rekomendo de rusa esperantistino. La prelego estas havebla por ĉiu, kiu volas prezenti ion pri Esperanto Nederland. Rob Groeneveld parolis kun SEL la 7-an de aprilo; SEL prezentis la strukturon de la asocio.

En la studosemajnfino en aprilo partoprenis 32 homoj, inter ili 12 novaj. 4 partoprenis en la porkomencanta kurso. Dum la semajnfino du partoprenantoj aliĝis al nia asocio.

La estraro kunvenis kun la organizantoj de la studosemajnfinoj la 15-an de marto por paroli pri la stato kaj eventualaj problemoj de la semajnfinoj. La du studosemajnfinoj en 2024 rezultigis profiton. Tion helpis la plialtigo de la kotizo de la semajnfinoj. La kostoj de la NIVON-domo Krikkenhaar plialtiĝas ĉiujare. La kotizo tial devos plialtiĝi laŭ la inflacio. En 2026 la kotizo estos € 105. Estontece la decido pri la sekvontjara kotizo la estraro faros kiam estas fiksita la buĝeto de la venonta jaro, do en la printempo antaŭ la jarkunveno. Averaĝe partoprenas 32 personoj; tio ne kaŭzas perdon, sed ioman profiton. Por ŝpari kostojn, la organizantoj serĉas instruantojn unue en Nederlando, antaŭ ol oni petos enloĝantojn de Flandrio veni en la rolo de instruisto. La kompenso por la kostoj de benzino, se iu venas aŭte, estas fiksita je € 0,18 por kilometro. Se necese, la asocio en neantaŭviditaj cirkonstancoj kompensas deficiton – pro la graveco de instruado de novaj adeptoj. Al maksimume du junuloj la asocio povas doni subvencio po € 40, se ili havas problemon pagi la kotizon de la studosemajnfino.

Dume okazis la jarkunveno la 10-an de majo en Utrecht. Loes Demmendaal adiaŭis kiel kasisto kaj Kees Neeft estis elektita kiel nova kasisto. La Verloren van Themaat-premio estis atribuita al Kajto: Nanne Kalma kaj Ankie van der Meer, kiuj kantis la kanton *Ĉi tiu tag'* kiel dankon pro la aljuĝo de la premio. La reelektado de du membroj de la Arbitracia Komisiono okazis dum la jarkunveno. La buĝetoj por 2024 kaj 2025 estas akceptitaj, inkluzive de la plialtigo de la membrokotizo en 2026. La nova kotizo estas € 41,50 jare.

Rob Groeneveld
sekretario

Renato Corsetti (1941—2025)

La 1-an de februaro 2025 forpasis **Renato Corsetti**, itala esperantisto, iama prezidanto de UEA kaj TEJO, honora prezidanto de ambaŭ asocioj. Li estis unu el la plej aktivaj nuntempaj esperantistoj, en pluraj roloj – interalie en la Komitato de UEA kaj Akademio de Esperanto. Malgraŭ la malsano li daŭrigis la laboron, laste ekzemple en la elekta komisiono de UEA. En la profesia vivo li estis bankisto kaj poste universitata profesoro pri psikopedagogio, okupiĝis pri sociolingvistiko kaj psikolingvistiko. Kun la edzino Anna Löwenstein li havis du filojn, ambaŭ denaskaj esperantistoj.



Bildo: Aleks Andre

Bonvenon!

Er zijn 3 mensen lid geworden sinds het vorige nummer van Fenikso:

- Jasper van der Heide woont in de stad Utrecht.
- Een nieuw lid, in mei lid geworden, woont in Noord-Holland.
- Tatiana Ivanovich woont in Den Bosch. Zij heeft pas onlangs kennisgenomen van Esperanto en is begonnen het te leren.

Van harte welkom! Wij hopen (weer) kennis met je te maken tijdens het studieweekend van 7-10 november 2025.

Leden – en andere belangstellenden – kunnen via Ineke Emmelkamp een lijstje krijgen met Esperanto-boeken. Deze boeken hebben wij gratis gekregen van mensen die

nu niets meer aan Esperanto doen.

Leesboeken en leerboeken! Er zijn ook CD's en DVD's aanwezig. Boeken, CD's en DVD's zijn wel tweedehands! Je betaalt alleen de verzendkosten. Stuur een mailtje als je belangstelling hebt

( informado@esperanto-nederland.nl).

Nieuwe leden kunnen gratis het grammaticaboek van Roel Haveman en Arjen-Sjoerd de Vries ontvangen. Alleen de verzendkosten worden berekend. Ben je al langere tijd lid en ligt je boek door veel gebruik uit elkaar? Dan kun je ook een nieuw exemplaar bestellen. Nieuwe deelnemers aan het studieweekend kunnen ook een exemplaar krijgen tijdens hun verblijf in Kriekenhaar.

Rob Groeneveld, secretaris



Esperanto-Kulturo (EsKu)

La videopodkasto *Esperanto-Kulturo (EsKu)* estis iniciatita antaŭ tri jaroj de Thierry Spanjaard kaj Pascal Vilain. En mallongaj, ĉirkaŭ 15-minutaj, filmetoj ili prezentis diversajn aspektojn de la Esperantaj kulturo, movado kaj historio. La celo evidente estas kleriga, sed la spektanto ne havas la senton partopreni pezan sciencan simpozion – la faktoj estas prezentitaj vikle, en facile digestebla maniero. Dum la tempopaso la karaktero de *EsKu* iom evoluis. Nuntempe ne plu temas pri duopaj prezentoj de Thierry kaj Pascal, sed pri intervjuoj, kiujn Thierry Spanjaard faras kun diversaj aktivuloj de la Esperanto-movado. Ĝis nun aperis 71 epizodoj kaj ĉiumonate aperas unu plia.

EsKu – Esperanto-Kulturo estas spektebla en YouTube
 <https://www.youtube.com/@EsKuEsperantoKulturo>



Nederlandse Esperanto-Jongeren

Wij zijn de Nederlandse vereniging door en voor jongeren en jongvolwassenen met een interesse in Esperanto.

NEJ staat voor Nederlandse Esperanto-Jongeren en is opgericht in 1965. Als NEJ organiseren we regelmatig activiteiten rond Esperanto in Nederland. Dit doen we voor jonge Nederlanders die Esperanto interessant vinden, maar ook voor jonge Esperanto-sprekers die Nederland willen leren kennen.

Een van de leukste dingen die je met Esperanto kan doen, is de taal gebruiken met buitenlandse mensen. Zo ervaar je dat Esperanto echt werkt. Daarom werken we veel samen met Esperanto-sprekers uit Duitsland, België, Frankrijk en vele andere landen. Ook bezoeken Nederlandse Esperanto-sprekers veel buitenlandse activiteiten. In de winter naar Duitsland of Polen, in het voorjaar naar België of Italië, en in de zomer zijn er tal van Esperanto-festivals in onder andere Hongarije en Slowakije. In de herfst is het jaarlijks de beurt aan de NEJ om een internationale bijeenkomst te organiseren in Nederland, met ons herfstweekend KKPS.

Wereldwijd zijn de verschillende landelijke Esperanto-

jongerenverenigingen verenigd in de Wereld Esperanto-Jongeren Organisatie (TEJO). Vanuit TEJO wordt jaarlijks het Internationaal Jongerencongres (IJK) georganiseerd, dat elk jaar in een ander land of zelfs continent is.

Als NEJ bieden we verschillende mogelijkheden aan om Esperanto te leren. Daarnaast krijgen NEJ-leden kortingen op evenementen van de NEJ en van Esperanto Nederland. Wil je lid worden van de NEJ, vul dan ons aanmeldformulier in. Wil je eerst nog wat meer van Esperanto weten of heb je vragen aan de NEJ, neem dan gerust contact met ons op.

Bestuur

Dit is het huidige bestuur van het bestuursjaar 2025:

- Frank van Hertrooij (voorzitter)
- Arnold Averink (secretaris)
- Spencer van der Meulen (penningmeester)
- Robin van der Vliet (bestuurslid)

Contact

Je kunt ons een e-mail sturen via

✉ info@esperantojongeren.nl. Daarnaast hebben we ook een Discord-server, Telegram-kanaal en YouTube-kanaal. Al de links en het aanmeldformulier zijn te vinden op onze website:

🌐 www.esperantojongeren.nl.

KKPS 2025

... kaj la reaktiviĝinta NEJ tuj organizas novan, sed jam tradician, junularan Esperanto-aranĝon!

Post KKVS 2024 en Belgio (Klaĉ-Kunveno de Verdaj Skoltoj), KKPS revenos al Nederlando en 2025 (Klaĉ-Kunveno Post-Somera)! La aranĝo okazos iom pli malfrue en la jaro ol kutime: de la 28-a ĝis 30-a de novembro 2025. La loko estos *De Coxse Boerderij* en Gemert, proksime al Flandrio kaj la Ruhr-regiono. La informoj pri kotizo kaj aliĝilo troveblas en la retejo de la evento:

🌐 kkps.esperantojongeren.nl.



La vespera programo de KKPS 2025

Teorio pri vortoj kiel intelekta testamento



Anna Löwenstein. *La memoraĵoj de Julia Agripina*. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 2021. 564 p. ISBN 9789077066737.

Prezo ĉe UEA: € 18,90 + AVI
Prezo ĉe FEL: € 20,00 /
bitlibro: € 12,00

Julia Agripina – virino inter multaj imperiestroj, eble eĉ: virino malantaŭ multaj imperiestroj. Ŝi estis pranepino de Aŭgusto, fratino de Kaligulo, edzino de Klaŭdio kaj patrino de Nerono. Dum la regado de la lastaj du, ŝi havis gravan influon malantaŭ la kulisoj.

Ŝi havis tumultan vivon – kaj ŝi eĉ verkis memoraĵojn. Bedaŭrinde tiuj memoraĵoj perdiĝis, krom unuopa fragmento konservita de postaj aŭtoroj. En sia romano *La memoraĵoj de Julia Agripina*, Anna Löwenstein revivigas ilin per fikciigita biografio.

Temas pri la ĝusta tipo de historia romano: ĉiuj konataj faktoj ŝajne estas fideinde enkorpiĝitaj, sed Löwenstein plenigas la truojn per konvinkaj kaj imagoplenaj detaloj. Julia fariĝas virino kun forta karaktero, kiu dum sia tuta vivo provas regadi siajn emociojn, virino kun grandaj talentoj – eble kun eĉ pli grandaj ambicioj – kiujn ŝi tamen ne povas plene realigi en socio dominata de viroj. Ŝi premas sian frustrigon kaj provas elĉerpi la eblecojn.

Löwenstein montras sian elstaran talenton por krei vivoplenecon en siaj scenoj: la unua nokto de dek-tri-jara Julia kun ŝia multe pli aĝa edzo, Domicio – la hororo de malsukcesa senvirgiĝo, la humiligo kiam li poste turnas sin al ŝia sklavo; la noktoj dum kiuj ŝi enfermas sin en malorda biblioteko dum ekzilo sur insulo; la luktado kontraŭ la akvo dum ŝiprompiĝo, ĉirkaŭita de aliaj luktantoj, inkluzive ŝian solan amikino, Pola.

La historia romano estas aparte taŭga ĝenro en Esperanta literaturo. Temas pri mondo iam reala, sed al neniuj legantoj intime konata – tiel ĉiuj legantoj, el ĉiu angulo de la mondo, estas egale traktataj. Kaj tute ne strangas, ke la roluloj parolas Esperanton: en ĉiu romano pri la antikva mondo, la aŭtoro ja uzas nuntempan lingvon. Löwenstein, kiu jam dum jardekoj uzas Esperanton hejme kaj publike, esprimiĝas nature kaj elegante. *Memoraĵoj* estas unu el la plej bonaj romanoj iam verkitaj en Esperanto – certe en la 21-a jarcento, eble ĝenerale.

Löwenstein estas ankaŭ dumviva feministo, kaj en la romano resonas multaj pensoj pri virinaj kaj viraj roloj. Sed ŝi traktas ankaŭ aliajn temojn: ekzemple, ĉu estus pli dezirinde havi gvidanton filozofian aŭ praktikeman, aŭ kiom kompleksaj povas esti niaj sentoj al aliaj homoj. Fine, la patrino Julia elstaras precipe – patrino de la malbonkreskigita, konfuzita Nerono, kiun ŝi sincere amas, sed kiu fine ordonas ŝian morton.

Marc van Oostendorp



De taveerne van Piet Rabbel

Ĉu vi konas ĉi tiun libron? Ĝi estas traduko de romano verkita originale en Esperanto. Dekojn da jaroj poste aperis ĉi tiu traduko en la nederlandan lingvon.

Ĉu vi scias la originalan titolon kaj la nomon de la aŭtoro de la libro?

En venonta *Fenikso* mi rakontos pli pri ĝi!

Ineke Emmelkamp

Manĝi tre bone, ridi kaj lerni tre multe

De 4-a ĝis la 6-a de aprilo 2025 okazis la Esperanta studosemajnfino en Krikkenhaar. Por mi tio estis la 7-a fojo. Ankaŭ ĉi-foje la semajnfino estis mojosa! Kun trideko da aliaj partoprenantoj mi manĝis tre bone, ridis kaj lernis multe. La vetero estis bela, mi pasigis la paŭzojn ekstere, sidante aŭ promenante en la ĝardeno, legu: malgranda arbaro. Laŭlonge de la promenvojo en la arbaro estas metitaj ĝardenaj gnomoj.

Unu vesperon kelkaj el ni faris longan promenadon en la ĉirkaŭaĵo, sed mi estis fakte iomete tro laca por tio (aŭ la vino estis tro bongusta kaj/aŭ la kompanio tro agraba...). La kursoj okazis en kvin niveloj. Mi estis en la grupo 4A, kiun gvidis Bert de Wit. Post la lecionoj al Bert ŝajnis, ke li instruas en malĝusta lando, eble en Indonezio, ĉar... la manoj de la instruistoj estis kisataj de la lernantoj! Tio estas signo de respekto. Feliĉe por ni kaj bedaŭrinde por Bert, tio ne estas kutimo en Nederlando. Eĉ ne se iu instruas bone kaj kreive.

Bert havis varian programon: ludojn, por pli paroligi nin, kaj gramatikajn ekzercojn, kiujn ni diligente faris. Mi lernis multe.

Yves Nevelsteen organizis malgrandan libroservon.

La sekva studosemajnfino okazos de la 7-a ĝis la 9-a de novembro 2025 kaj mi certe aliĝos. Ĉu ankaŭ vi?

Mariska de Jonge





Ĉi-sube troviĝas poemo, kiun verkis unu el la grupoj dum la studosemajnfino.

Vere tamen...

Longe kapitalo "marŝas sur ferplandoj"
Ĝi kaŝas maske Muskon monarbare,
Nun lia povavido malavare
Restigas spacan polvon sur la strandoj.

Trompas Trumpeton li kvazaŭ memstare,
Per fadenaj manetoj inter vandoj;
Disvastigas tiel fipropagandoj
Tra nebuloj mensogaj tuthomare!

Kaj homoj ekstergregaj pensas aliel:
Nu! Homoj estu libermanaj ĉiel,
For la kalkuladon de ekonomo!

Homfeliĉon naskos la solvo paca:
En "rondo familia" senminaca
La vero fariĝos komuna domo!

Responde al la poemo Tamen... de Kalocsay

La Krikenhara Kvinopo estas alfabetorde: Federico Gobbo, Anneke Schouten-Buijs, Jan Snoek, Hiddo Velsink, kaj Harm Voortman.

la 6-an de aprilo 2025



Kiu gajnis la Premion Verloren van Themaat?



La Premio Verloren van Themaat estas distingo de nia asocio por homoj kiuj aktivis por altiri atenton al Esperanto en la nederlandaj amaskomunikiloj. Ni ĉiuj scias kiom grava tio estas: neniu eklernas Esperanton tute hazarde. En la pasintaj jaroj la premio estis aljuĝita al diversaj personoj, kiuj kontribuis al tiu celo per plej diversaj rimedoj. Pasintjare, ekzemple, ĝi estis atribuita al profesoro Federico Gobbo, kaj la jaron antaŭe al Foppe-Klaas Hovinga.

La ĉi-jaraj premiitoj estas denove elstaraj. Temas pri du personoj kiuj, figure dirite, senĉese sukcesas direkti la atenton al Esperanto – ĉiam en pozitiva kaj kreema maniero: **Nanne Kalma** kaj **Ankie van der Meer**, pli konataj en esperantistaj rondoj kiel Kajto.

Estas ja pli da muzikistoj en Esperantujo, sed malmultaj tiel konsekvence uzas sian allogan muzikon por disvastigi nian lingvon. Kajto faras tion efike, ne limigante sin al Esperanto, sed ankaŭ kantante en la nederlanda, frisa kaj angla. Per tio ili atingas publikon kiu eble neniam antaŭe aŭdis pri Esperanto – kaj tiu publiko malkovras ĝin nature, sen devigo. Bona ekzemplo estas la fakto ke pasintjare pluraj artikoloj pri la duopo aperis ĉe Omrop Fryslân kaj en la revuo *Friesland*, kun klara mencio de Esperanto.

Jam de jardekoj Nanne kaj Ankie donacas al ni sian muzikan talenton. Kun profunda respekto por la riĉeco de la frisa kulturo kaj la internacia lingvo, ili sukcesis krei ponton inter lokeco kaj tutmondeco, inter tradicio kaj novigo.

Sub la nomo Kajto, ili prezentas ekde la malfruaj 1980-aj jaroj kantojn artismajn kaj samtempe popularajn. Ili enmuzikigis verkojn de granduloj de la Esperanta literaturo – kiel William Auld, Gerrit Berveling, Julio Baghy kaj Poul Thorsen – kaj revivigis tiujn vortojn per melodioj kiuj tuŝas la koron. Iliaj albumoj – *Procesio multkolora*, *Tohuvabohuo*, *Masko* kaj aliaj – fariĝis fundamentaj en la Esperanta kantaro.

Sed ilia kontribuo ne limiĝas al melodioj. Per siaj koncertoj – en kongresoj, festivaloj, lernejoj kaj salonoj – ili inspiras generaciojn de esperantistoj senti sin parto de viva kaj krea komunumo. Ili ne nur prezentas muzikon: ili kreas spacon por kuneco, por partopreno, por vivanta kulturo.

Tial, kun granda ĝojo kaj profunda dankemo, ni hodiaŭ aljuĝas al Nanne Kalma kaj Ankie van der Meer la Premion Verloren van Themaat. Ili estas ne nur kantistoj, sed veraj pontfarantoj inter lingvoj, kulturoj kaj homoj – kaj elstaraj ambasadoroj de la du veraj internaciaj lingvoj: muziko kaj Esperanto.

Raporto el la jarkunveno de Esperanto Nederland

La 10-an majo 2025 en Kargadoor en Utrecht okazis la jarkunveno de nia asocio Esperanto Nederland. La kunsidon oni komencis per unu minuto da silento omaĝe al la naŭ membroj forpasintaj en la lasta jaro.

Sekvis anonco pri la ĉi-jaraj ricevintoj de la premio Verloren van Themaat. Temas pri la muzika duopo Kajto: Nanne Kalma kaj Ankie van der Meer. Ilia muzikumado ne nur servas kiel plezurigo por nia komunumo, sed ankaŭ helpas en la informado pri la lingvo, taksis la estraro. (La laŭdon laŭtleĝitan dum la jarkunveno de Marc van Oostendorp legu sur la apuda paĝo.) Kajto dankis la estraron kaj ĝojigis la publikon per kanto. Ĉiu ĉeestanto ricevis donace muzikan KD-on de Kajto.

Sekvis financaj informoj de la kasisto. Loes Demmendaal informis, ke la bilanco pri la lasta jaro estas pozitiva – eĉ se ne multe (51,86 eŭroj), tio ne okazis jam de multaj jaroj. Al tiu financa ekvilibro en 2024 kontribuis i.a. la studsemajnfinoj – kiuj dank’ al granda partopreno kaj pli alta kotizo – estis profitaj, donacoj (kiuj daŭre estas bonvenaj) kaj pli alta membrokotizo. Ankaŭ la Kultura Tago en Zutphen fine kalkuliĝis profita. Dank’ al donacoj de membroj, la estraro sukcesis akiri 5.054 eŭrojn por la financado de la Amsterdama Katedro; dufoje venis anonima donaco de 1.500 eŭroj.

La estraro proponis altigi la membrokotizon por la venonta jaro. Ĉi-jare la kotizo estas 40 eŭroj, venontjare ĝi estu 41,50 eŭroj, kion la kasisto pravigis per enorma inflacio. La kunvenintoj akceptis tiun proponon.

En la lastaj ok jaroj la asocia kapitalo malkreskis je 40.000 eŭroj (averaĝe 5.000 eŭroj jare) kaj nun necesas ŝpari ĉie, kie tio eblas. La estraro deziras, ke la aranĝoj – kiel la studsemajnfinoj kaj Kultura Tago – strebu al financa sendependeco, ili principe ne devus kaŭzi pliajn elspezojn, sed mem financi sin el la kolektitaj kotizoj de la partoprenantoj. Kompreneble, eventuala malprofito estu kovrita el la asocia kaso, sed oni ne buĝetu aŭtomate malprofiton.

Prof. Federico Gobbo informis pri la situacio de la Biblioteko de UvA. Ĝi estas nun en transira periodo. La studentoj malofte prunteprenas fizikajn librojn. Gobbo ne kontraŭstaras ŝpari je la kultura donaco al la Biblioteko.

Esperanto-Klubo de Eindhoven (EKE) pretas fordonaci siajn librojn al homoj, kiuj povas bone uzi ilin. EKE devas malpleniĝi la ŝrankon, en kiu troviĝas la kluba biblioteko.

La estraro proponis modifi la *Huishoudelijk reglement*. La sumo, kiun oni ĉiujare dediĉas la la premio Verloren van Themaat formangas tro grandan parton de la membrokotizoj. La estraro deziras, ke ekde nun oni ĉiujare fiksu la sumon por la premio en la jara buĝeto. La propono estis akceptita.

Loes Demmendaal demisiis kiel kasisto de Esperanto Nederland, lige kun la fino de ŝia oficperiodo. Ŝi estas unu el la kunfondintoj de la asocio, okupis diversajn postenojn en la Esperanto-movado. (Por ekscii pli, legu la intervjuon en ĉi tiu numero de *Fenikso*.) Sekvis aplaŭdo kaj dankoj. Kiel la nova kasisto estis elektita Kees Neeft, kiu jam ekde kelka tempo observas la estraran laboron por plifaciligi la transdonon de la ofico. Marc van Oostendorp kaj Peter van Noorden estis reelektitaj.

La sekva studsemajnfino okazos de la 7-a ĝis la 9-a de novembro 2025 en la kutima loko, en Krikkenhaar, kun kursoj je kvin lingvonivelejo. Ekde la pasinta jaro ankaŭ en Belgio okazas studsemajnfino (sub la nomo BEST – Belga Esperanto-Studsemajnfino), unufoje jare – la sekva en februaro 2026. Ankaŭ en Svedio oni intencas komenci similan aranĝon laŭ la sukcesa nederlanda modelo.

Daŭras la laboroj pri la nova retejo, intertempe jam publikigita. La kunsidoj okazas ĉiusemajne, la teamo daŭre laboras pri la nova enhavo.

Kees Neeft, ĵus elektita en la estraron, ricevis la diplomon okaze de la 25-jara membreco en Esperanto Nederland. Katalin Kováts informis pri la KER-ekzamenoj, aparte je la nivelo C2. Ĉi-jare oni serĉos la plej bonan reganton de Esperanto kaj bonvenas nederlandaj kandidatoj.

Andries Hovinga demandis, ĉu Esperanto Nederland plu partoprenu en la socia retejo X (antaŭe Twitter). La reago estas unuanima – oni nuligu la asocian konton tie. Esperanto Nederland plu aktivos en Facebook. Federico Gobbo sugestas krei konton ankaŭ en BlueSky.

Paweł Fischer-Kotowski

Mia mondo estas pli larĝa dank' al Esperanto

Intervjuo kun Loes Demmendaal

Loes Demmendaal, unu el la kunfondintoj de nia asocio, en la lasta jarkunveno decidis eliri el la estraro. *Fenikso* intervjuis ŝin por ekscii pli multe pri ŝia multjara agado kaj la rolo de Esperanto en ŝia vivo.

Via aventuro kun Esperanto estas longa, ĉar vi devenas el Esperanta familio, ĉu?

Jes, sed mi ne estas denaska esperantisto. Mia patrino eklernis Esperanton en 1963, kiam ŝi ekinteresiĝis pri la lingvo, kiun antaŭe, iam en la 1930-aj jaroj, lernis ŝia patro. Ŝi korespondis kun familio Rybaček el Ĉeĥoslovakio, el kiu la edzo gajnis premion pri fotografio en la Belartaj Konkursoj de UEA. Li venis al Nederlando kun sia edzino por libertempi per la gajnita mono. Ili venis en 1965 kaj pasigis ĉi tie dek tagojn, gastante en nia hejmo. Mia patrino parolis kun ili en Esperanto kaj la patro en la germana kun la edzo.

Kaj vi?

Mi ĉefe silentis. Kaj mia fratino Inge forestis en tiuj tagoj, do ŝi eĉ ne ekkonis tiun familion samtempe, nur poste.

Do, kiam vi lernis Esperanton?

Inge kaj mi lernis Esperanton en oktobro 1965 ĉe sinjorino Nelly Vollegraaf pere de *Tom kaj Tina* kaj *Sinjoro Muso*. Ĉar la sekvan jaron ni iris por revizito ferii en Ĉeĥoslovakio. Ĉiuj – la patro, Inge kaj mi – devis lerni la lingvon por povi komunikiĝi. En tiu familio estis du filinoj, miaj samaĝulinoj. Ankaŭ ili eklernis Esperanton. Ni restas en kontakto ĝis nun!

Ĉu vi daŭre regule renkontiĝas?

Nun ne plu, sed en 1968 mi iris al Ĉeĥoslovakio denove, tiufoje sola. Sola junulino iris al Ĉeĥoslovakio! Mi partoprenis SET-tendaron en Lancov kaj, memoru, tio estis 1968... Mi revenis en Nederlandon unu tagon antaŭ la komenco de la rusa invado. Hazarde. Mi eĉ ne volas imagi, kio okazus al mi – tiam 13-jarulino – se mi restus tie nur iomete pli longe...

Kia bonŝanco!

Jes, apenaŭ imageble. Interese, ankaŭ mia avo, revenis poste al Esperanto kaj plurfoje kuniris por viziti tiun familion en Ĉeĥoslovakio. Sed miaj gepatroj ĉiujare vizitis ilin dum pli ol 30 jaroj.



Do, tiuj viaj kontaktoj en Ĉeĥoslovakio spronis vian postan aktivadon en Esperantujo.

Jes, tio estis bela komenco, kiu ligis min por ĉiam al Esperanto. Mi ekaktivis en la nederlanda movado. Mi partoprenis en Roterdamo junularan klubon kaj membris en sekcio 2 de FLE, la laborista Esperanto-klubo en la sudo de Roterdamo, temis ĉefe pri havenlaboristaj esperantistoj. Mia familio membris en FLE kaj SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda), partoprenis kaj organizis SAT-kongresojn. En 1971, dum la SAT-kongreso en Parizo, mi konatiĝis kun Laŭro Gabaldá, franca esperantisto. Ni enamiĝis, sed du jarojn poste li aŭtomobile akcidentis survoje de Maroko (kie li anstataŭe militservis) al Barcelono (kie li devis viziti sian avinon). La lokaj aŭtoritatoj de la loko, kie okazis la akcidento, ne plusendis la informojn al Madrido, tial ni ne povis trovi lin. Mi alskribis membrojn de SAT kaj delegitojn de UEA por peti ilian helpon. Kaj ĝuste tiel ni trovis ke li mortis en Tortosa.

Kaj vi tamen rapide havis ligojn ankaŭ kun la neŭtrala movado.

Prave, en 1977 mi eklaboris en la Centra Oficejo. Ĝis tiam mi studis por fariĝi dietistino, sed tiutempe estis malfacile okupiĝi pri tio profesie. Kiam aperis la eblo labori en Esperanto, mi tuj kaptis la okazon. Mi konatiĝis tiam kun mia posta edzo Stefan MacGill. Mia vivo fariĝis jam komplete Esperanta!



Loes Demmendaal kun Peter van Noorden. Fonto: Peter van Noorden

Kiel vi aktivis por Esperanto?

Tio estis ĉefe organiza laboro. Partopreni aranĝon estas interese, sed kunorganizi ĝin estas por mi eĉ pli alloga. En FLE (Federacio de Laboristaj Esperantistoj) ni zorgis pri la Faulhaber-semajnfinoj, kiuj estus iom kompareblaj kun la nuna Kultura Tago de Esperanto Nederland, kaj pri la studsemajnfinoj, kiujn ni tiam iniciatis. Ili okazis tiam plurfoje dum la jaro. Krome ni eldonis nederlandlingvan revuon pri Esperanto. Mi estis sekretario (1978–1983), kasisto (1983–1987) kaj fine ankaŭ prezidanto de FLE (1987–1994). En 1994 okazis granda unuiĝo de diversaj eroj de la nederlanda Esperanto-movado, el kiu naskiĝis Esperanto Nederland. Mi kuniniciatis tiun procezon kaj kungvidis ĝin ĝis la fondiĝo de la nova asocio.

Sed vi ne plu aktivis en Esperanto Nederland, ĉu?

Ne vere. Mi ja estis membro, sed min logis ankaŭ la internacia movado, UEA, por kiu mi fakte decidis ekstudi ekonomion. Tiel mi povis kontribui al la movado, helpante pri la financaj aferoj. Jam en la 1980-aj jaroj mi estis membro de la Financa Komisiono de UEA kaj de la Virina Komisiono de UEA. Mi ankaŭ helpis en la starigo de la revuo Sekso kaj Egaleco de Anna Löwenstein. Poste, en la jaroj 1998–2001 kaj 2004–2007 mi estis komitata revizianto kaj en 2007 mi eniris la estraron de UEA kiel respondeculo pri administrado kaj financo.

Tio estas multe da laboro...

Jes, certe. Kaj aldone mi estis LKK-ano en du Universalaj Kongresoj, kiuj okazis en Roterdamo – en 1988 kaj en 2008.

Mi respondecis tiam pri la programo.

Kaj tamen vi revenis al pli aktiva rolo en Esperanto Nederland. En 2016 vi fariĝis kasisto. Kial?

La ĉefa problemo estas manko de personoj kiuj pretas eniri la estraron. Homoj volonte venas, partoprenas kursojn kaj aranĝojn, sed estas malfacile trovi tiujn, kiuj pretus preni sur sin ankaŭ respondecojn... Mi decidis kontribui tiom, kiom mi povas.

Kaj ni dankas vin pro tio!

Kaj mi dankas multon al Esperanto. Mia vivo ne estus tiom internacia sen Esperanto. Dank' al la lingvo mi vivis ekde la junaĝo en internacia medio. Kaj pere de la laboristaj esperantistoj mi lernis pri la monda literaturo. Tio estis havenlaboristoj, kiuj vere konis literaturon tra Esperanto. Do, mia kleriĝo, internacia kleriĝo, venas de Esperanto kaj mi estas tre danka pro tio. Mia perspektivo estas tiom multe pli larĝa ol ĉe multaj aliaj nederlandanoj – kaj tion mi ŝuldas ĝuste al Esperanto. Mi fakte daŭre sentas tion: mi rekonas finnajn aferojn, danajn, ĉinajn aferojn, kiuj aperas ie en la amaskomunikiloj, en rakontoj, en libroj. Mi scias iom pli multe pri la hispana kaj franca kulturoj. Mi estis plurfoje en Latinameriko kaj Japanio. Por ne paroli pri la orienta Eŭropo – mi iris tien, kiam tio estis ankoraŭ komplete nekutima ĉi tie. Dank' al tio mia mondo estas tiom pli larĝa!

Intervjuis Paweł Fischer-Kotowski

Interasocia kongreso de Esperanto en Francio 2025

Pri Jules Verne kaj metala elefanto

En junio okazis en Nanto la ĉi-jara kongreso de Esperanto France. La tritaga riĉa programo enhavis ion por ĉiuj: de kurso de Esperanto por komencantoj, tra rid-jogosesio ĝis diversaj interesaj prezentoj, ekskursoj kaj ankoraŭ multe pli.

Nanto estas konata interalie pro la verkisto kaj viziulo Jules Verne, kiu famiĝis pro siaj sciencfikciaj verkoj. Speciale interesa estis la prelego de István Ertl, kiu parolis pri la interesiĝo de Jules Verne pri nia lingvo. La verkisto favoris la ideon de Esperanto kaj en unu el liaj lastaj verkoj la lingvo ludis tre gravan rolon. Bedaŭride li forpasis antaŭ ol li povis finverki ĝin. Post la morto de Jules, lia filo Michel finverkis la libron, sed li skrapis la partojn pri Esperanto.

Dum ekskurso ni vizitis la Insulajn Maŝinojn (*Les Machines de l'île*) – temas pri arta projekto kaj amuzparko de grandegaj fantaziaj bestoj el metalo,

inspiritaj de la ideoj de Jules Verne, Leonardo da Vinci kaj forte influitaj de la ĝenro vaporpunko. La 12-metrojn alta elefanto fariĝis eĉ simbolo de la urbo.

Barbara Gulminelli gvidis nin dum alia ekskurso al la muzeo de Jules Verne. La eta sed ĉarma muzeo situas en belega loko sur monteto ĉe la bordo de Luaro kaj rakontas pri la vivo de la verkisto kaj lia inspiro por la verkoj.

Dimanĉe ni gustumis turkajn manĝaĵojn dum la tagmanĝo. Vespere Gabin Forcier prezentis sian filmon pri la vojaĝo tra Eŭropo pere de Esperanto kaj poste koncertis Kajto. Menciinda estas ankaŭ la prelego de Pascal Dubourg-Glatigny pri Lucien Péraire – esperantisto, kiu dum la jaroj 1928 ĝis 1932 faris nekredeblan biciklan vojaĝon ĝis orienta Azio.

Ron Winteraeken



Post la kverelo inter la usona prezidento Donald Trump kun la ukraina prezidento Volodimir Zelenskij en la Blanka Domo en Vaŝingtono, Marc van Oostendorp ĵetis iom da lumo sur la lingvan aspekton de ĉi tiu situacio. En sia opinia artikolo en la retejo de la gazeto *de Volkskrant* li argumentis, ke Trump liveris novajn argumentojn kontraŭ

la ĝenerala superrego de la angla lingvo. Libera Folio aperigis esperantigon de tiu teksto, kiun ni republikigas ĉi-sube kun la afabla permeso de la aŭtoro. La nederlandlingva originalo estas legebla (nur por la abonantoj) en la reto: <https://mallonge.net/1sh>

Trump donis novajn argumentojn por Esperanto

Tra la mondo ni dependas de Usono en multaj internaciaj aferoj, kaj tio fariĝas aparte evidenta en momentoj, kiam Usono ne plu volas ludi la rolon de policisto sed tiun de mafiestro de la mondo. Tio validas ankaŭ pri la angla lingvo. Eble en ĉi tiuj malcertaj tempoj ne plu estas tiom absurda la ideo pri lingvo, kiu povus unuigi anstataŭ disigi la homaron, skribas Marc van Oostendorp.

La usona prezidanto Donald Trump kaj vicprezidanto JD Vance lerte uzis la ilon de potenco nomatan 'lingvo' dum sia renkontiĝo kun la ukraina prezidanto Volodimir Zelenskij lastvendrede. Ilia celo estis timigi kaj superruzi sian kunparolanton, kaj la fakto, ke la konversacio okazis en la angla, donis al ili klaran avantaĝon.

Aŭskultante anglalingvajn paroladojn de Zelenskij en la lastaj jaroj, oni rimarkas, ke li plibonigis sian lingvaĵon por pli efike plenumi sian diplomatan rolon. Ĉu Trump aŭ Vance regas alian lingvon krom la angla, restas nekonate. Ili profitis de sia denaska lingvo por starigi lingvan baron kontraŭ Zelenskij, kiu bezonis frakcion de sekundo pli por vortumi siajn pensojn. Tiun mallongan momenton la usonanoj lerte utiligis.

La mondo jam kutimiĝis al la angla kiel la lingvo de la internacia ordo – ŝajne neŭtrala ilo por komunikado. Sed kiel la esperantistoj certe scias, tio signifas, ke la plimulto de la homaro devas lerni ĝin kun granda penado, nur por trovi sin superita de homo, kiu havas la naturan avantaĝon paroli sian denaskan lingvon.

Tra la mondo ni dependas de Usono en multaj internaciaj aferoj, ne nur lingvaj, kaj tio fariĝas aparte evidenta en momentoj, kiam Usono ne plu volas ludi la rolon de policisto sed tiun de mafiestro de la mondo. Multaj kernaj aspektoj de la interreto restas en usonaj manoj. Eŭropaj registaroj kaj entreprenoj stokas vastajn kvantojn da sentemaj datumoj en usonaj serviloj, kiujn usonaj aŭtoritatoj povas aliri sub certaj kondiĉoj.

Sed la sama problemo validas por la angla lingvo. Oni ofte prezentas ĝin kiel neŭtralan lingvon, sed kiel ni scias, ĝi estas la lingvo de malgranda grupo de ŝtatoj, kiuj devenas de la brita imperio. Donald Trump komprenas ĉi tiun potencon pli bone ol multaj: en la tago de la renkontiĝo kun Zelenskij, li dekretis, ke la angla fariĝu la sola oficiala lingvo de Usono.

Nun, kiam la monda ordo ŝanceliĝas, ni havas la ŝancon rekonstrui ĝin pli juste kaj demokratie – tiel ke ne unu sola popolo havu specialajn privilegiojn en internacia interagado. Alivorte, la klasikaj argumentoj de Zamenhof pri neŭtrala mondlingvo ree fariĝas aktualaj.

Dum longa tempo oni mokis tiun ideon, konsiderante ĝin naiva, ĉar la mondo ja elektis la anglan. Sed eble, en ĉi tiuj malcertaj tempoj, ĝi ne plu estas tiom absurda: lingvo, kiu povus unuigi anstataŭ disigi la homaron. Lingvo, kiu jam dum pli ol jarcenton funkcias en malgranda, sed dediĉita komunumo, kaj en kiu oni povas ĉion fari kion oni bezonas en internacia komunikado sur pli justa bazo.

Ĉu tio signifas, ke tiam ne plu ekzistus politikistoj, kiuj misuzas sian potencon? Ankaŭ pri tio ni jam trovis la respondon: kompreneble ne estus tiel. Sed unu potenca ilo estos forprenita el iliaj manoj.

Marc van Oostendorp

de Volkskrant

Log in

Abonneren vanaf €2,30 per week

[na](#)
[Columns](#)
[Opinie](#)
[Cartoons](#)
[Podcasts](#)
[Cultuur & Media](#)
[Foto](#)
[P](#)

Opinie: Eén machtsmiddel kunnen we Trump alvast uit handen slaan: het Engels

We kunnen doen alsof Engels een neutrale taal is, maar de ruzie tussen Trump en Zelensky maakte pijnlijk duidelijk dat dit niet zo is. Misschien wordt het daarom tijd voor een taal die kan verbinden in plaats van verdelen.

Marc van Oostendorp 2 maart 2025, 17:34

Deelnemen

Deeln



Benata Hengstmengel-Koopmans
✉ benata@zonnet.nl

Revuo-interŝanĝo estas projekto por prezenti enhavon de aliaj revuoj.

Normanda Esperanto-Bulteno

NB 291 (<http://bit.ly/NB-Kolekto>)

Hanneke Versteeg el Wervershoof ricevis tiun ĉi revuon (kaj plusendis ĝin al mi), ĉar ŝi gastigis Bertrand kaj lian edzinon el Hérouvillle (Francio) per Pasporta Servo.

- Artikolo pri Edgar de Wahl el Estonio, la aŭtoro de la lingvo Okcidentalo.
- Diversaj anoncoj de kunvenoj, kursoj, kongresoj k.t.p.

Kontakto

2025:1, n-ro 322

- Stela Besenyei-Merger el Hungario skribas: *Adiaŭ al mortaj pluvombreloj*.
- Artikolo de Alessio Giordano el Svislando/Italio pri *Diino Nikotino*, temas pri tabako kaj drogoj.
- Prepare al la ĉi-jara Internacia Junulara Kongreso (IJK) Arya Ferduzi el Indonezio avertas pri *Indoneziaj nekutimaj kutimoj*.

La Revuo Orienta

Novembro 2024, n-ro 11 (1224), 105-a jaro

- Pri la 3-a Komuna Esperanto-Kongreso de Japanio kaj Koreio, 4-6 oktobro 2024 en Jeonju.
- Du komencantoj vojaĝis al la UK en Aruŝo kaj skribas pri siaj impresoj.
- Feliĉe ne mankas gejunuloj dum la kunsidoj en Japanio.

Decembro 2024, n-ro 12 (1225), 105-a jaro

- Kelkaj fotoj pri la Komuna Kongreso kiu estis "vigla kaj diverseca".
- Raporto pri la 97-a SAT-Kongreso en Porto (Portugalio).

Januaro 2025, n-ro 1 (1226), 106-a jaro

Ankoraŭ komuna foto de la dulanda kongreso, kiun partoprenis esperantistoj el 15 landoj!

Norvega Esperantisto

n-ro 1/2025

- Diversaj artikoloj pri la Novjara Renkontiĝo 2024/25 en Wiesbaden (Germanio).
- Klaas Dijkstra el Antverpeno memorige skribas: *Spektu kinofilmojn kun Esperantaj subtekstoj!*

Israela Esperantisto

n-ro 178 (aŭtuno 2024)

- Amri Wandel en artikolo *Mia afrika Universala Kongreso de Esperanto* memorigas la iniciaton de Hans Bakker, kiu stimulis Esperanton en Afriko antaŭ tri jardekoj!
- Diversaj artikoloj pri la teruraĵoj en Gazao kaj la milito en Ukrainio.

Dia Regno

n-ro 2024-6 (969)

Artikolo pri Titus Brandsma (1881–1942): *Esperantisto, martiro, patrono de IKUE*



Titus Brandsma. Bildo: Nationaal Archief

n-ro 2025-1 (970)

Anonco: KELI-kongreso 2025 en Pardubice (Ĉeĥio) estas nuligita, pro tro malmultaj aliĝoj!

Du svingiloj

Du infanoj estas en la ludejo. Ili staras ĉe la svingiloj. Unu svingilo pendas je ŝnuroj, la alia pendas je metalaj stangoj. Ambaŭ svingiloj estas same longaj kaj tiel konstruitaj, ke oni povas fari kompletan turnon kun ili. Bram sidigas sur la svingilo kun la ŝnuroj, kaj Mark amuziĝas sur la svingilo kun la metalaj stangoj. Post iom da tempo la infanoj kuraĝas fari 360-gradan turnon. La defio estas trovi la minimuman rapidecon, per kiu tio eblas. La patrinoj observas la ludon de siaj knaboj.

- Mi trovas tion danĝera – diras Jenka – ili estas veraj riskemuloj.
- He, mi vidas ion strangan – diras Lenja.
- Jes, ili faras rondojn. Knaboj, estu singardaj. Atentu!
- Sed tio estas stranga. Tiuj svingiloj estas same longaj, do la svingotempo devus esti la sama. Sed Bram faras pli da turnoj ol Mark. Io ne ĝustas ĉi tie.

Jenka vaste oscedas. Tiaj rezonoj ne interesas ŝin. Dum ŝi prenas revuon, Lenja elprenas kraĵonon kaj notblokon el sia sako...

En la plej malalta punkto, vi devas havi sufiĉe da rapideco. Tiu energio estas necesa por atingi la plej altan punkton kontraŭ la gravito. Lenja atente observas. Kaj ŝi vidas, ke Mark (kun la stangoj) preskaŭ haltas ĉe la plej alta punkto de la cirkla vojo. Sed Bram (kun la ŝnuroj) klare ankoraŭ havas rapidecon tie.

– Tio estas pro tiuj ŝnuroj – pensas Lenja – Tio estas la sola diferenco inter la du svingiloj.

Ŝi faras skizon de la situacio. En la plej alta punkto agas la pezo, kompreneble. Ĝi ĉiam ekzistas. Tiu forto estas subtenata de la stangoj. Sed se Bram haltus en la plej alta punkto, li simple falus malsupren. Por ne timigi Jenka, ŝi ne kundividis tiun penson kun ŝi. Bram devas konservi sufiĉan rapidecon, por ke ekzistu centripeta forto. Kaj dum la knaboj amuziĝas, ŝi konsideras la situaciojn:

1. Mark – kun stangoj

La rapideco en la plej malsupra punkto devas doni sufiĉe da energio por superi la pezon. La mezuma rapideco de Mark, $v_{\text{Mark}} \approx \sqrt{g \cdot r}$


2. Bram – kun ŝnuroj

La rapideco en la plej malsupra punkto devas doni sufiĉe da energio por superi la pezon kaj resti ankoraŭ rapideco por la centripeta forto. Do tiu rapideco devas esti pli granda. La mezuma rapideco de Bram, $v_{\text{Bram}} \approx 1,6\sqrt{g \cdot r}$

Se Mark faras 10 turnojn, Bram faras iom pli ol 16.

Se vi volas pli profundan komprenon, alklaku la suban QR-kodon. Mi ŝatas ekvaciojn kaj matematikon, sed se matematiko ne estas via kampo, la rakonto povas esti iomete seka.

Harm Voortman



A	O	O	O	T	N	A	M	A	K	I	Z	U	M	A
L	R	M	R	I	K	O	N	C	E	R	T	E	J	O
L	O	A	S	B	K	O	M	F	O	R	T	O	K	V
E	S	Ĉ	N	I	I	T	I	N	E	R	O	O	I	E
E	A	P	B	I	R	L	L	O	O	E	D	D	O	T
T	V	O	E	L	D	U	D	S	S	I	N	R	I	U
R	G	P	L	K	T	R	T	I	V	A	A	O	C	R
I	N	O	A	I	T	A	O	E	V	T	L	B	I	M
N	I	L	R	C	C	A	R	R	N	G	R	R	Z	A
K	L	F	T	I	S	S	K	A	E	S	E	A	O	P
M	R	E	O	B	E	A	Ĝ	L	M	T	T	M	P	S
O	U	S	J	C	A	A	Ĉ	I	O	E	S	L	S	A
N	L	T	O	O	J	O	V	R	E	F	K	K	K	N
O	P	O	O	O	L	U	M	A	F	N	E	S	E	O
O	D	A	V	R	E	S	N	O	K	R	U	T	A	N

Frazo:

Vojaĝi

buitengewoon - e
buitenland - e
comfort - k
concertgebouw - k
fietsen - b
fooi - t
kust - m
meertalig - p
metrostation - m
muziekiefhebber - m
natuurbescherming - n
onbekende - s
reisgezelschap - v

reisgids - g
reisroute - i
reisziekte - v
schone kunsten - b
schouwspel - s
spoorweg - f
tentoonstelling - e
toerisme - t
verscheidenheid - d
volksfeest - p

La solvo de la vortserĉenigmo en la antaŭa numero de *Fenikso* (n-ro 2/2025) estas:

"Aprila vetero trompa aereo". La ĝustan solvon sendis Foppe-Klaas Hovinga, Rob Moerbeek, Gerard Peet kaj Frans Verhulst. Gratulon!

La ludo estas kreita de Det Koning. Sendu vian solvon al

✉ redakcio@esperanto-nederland.nl

Akademio de Esperanto havas naŭ novajn membrojn

La Akademio de Esperanto, nia plej grava lingva institucio, konsistas el 45 membroj. Ĉiun trian jaron okazas elekto de triono de membroj por la 9-jara oficperiodo. Pro forpasoj kaj demisioj oni povis en februaro 2025 elekti 19 personojn (el 21 kandidatoj). Inter la elektitoj naŭ personoj estas novaj en la Akademio, temas pri: Eckhard Bick, Cho Sung Ho, Gong Xiaofeng (Arko), Abel Montagut, Jorge Rafael (Rafa) Nogueras, Jukka Pietiläinen, Maria Rosaria (Sara) Spanò, José Antonio Vergara kaj Birke Dockhorn.

En la Akademio membras ĉi-momente du nederlandlingvanoj: Marc van Oostendorp (Nederlando) kaj Paul Peeraerts (Belgio). Gerrit Berveling ne rekandidatiĝis.

Pli da informoj pri la taskoj kaj laboro de la Akademio de Esperanto vi povas trovi en ĝia retejo:

✉ <https://www.akademio-de-esperanto.org>

Oproep voor bijdragen

Elk lid van Esperanto Nederland houdt zich op zijn of haar manier bezig met Esperanto, variërend van het bestuderen van de grammatica, het schrijven van gedichten of andere teksten, tot het ontmoeten van andere esperantisten, fysiek of op sociale media. We roepen je op om je ervaringen met ons te delen. Je verhalen zijn meer dan welkom, zowel in het Esperanto als in het Nederlands. Stuur ook foto's mee.

Grammaticale fouten corrigeren we. Inkorten en andere aanpassingen doen we zo veel mogelijk in

overleg. Wanneer je wilt, kunnen we ook een interview houden. Neem bij langere teksten eerst even contact met ons op. Stuur je bijdrage naar:

✉ redakcio@esperanto-nederland.nl

muziekrecensie gedicht
tekening evenement
vertaling verslag informatie
onderzoek brief boekrecensie aanbod
beeldverhaal filmpje
beschouwing gamerecensie
foto's verhaal column artikel
vraag fotoverslag

La Komencinto

Teksto kaj desegnoj: Thijs van Viegen



Studieweekenden in november 2025 en in mei 2026

In november 2025 gaan we weer naar het natuurvriendenhuis Krikkenhaar in Bornebroek. De datum is van 7 – 9 november 2025. De docenten zijn: Rob Groeneveld, Roel Haveman, Fransuaz Balza, Marc van Oostendorp en Bert de Wit zijn de docenten voor dit weekend. Elke docent geeft les aan een groep.

De kosten zijn € 100 voor leden van Esperanto Nederland, NEJ of een andere landelijke Esperanto-organisatie. Anderen betalen € 110. In de prijs zijn inbegrepen: lessen, overnachtingen, maaltijden, koffie en thee. Meer informatie en aanmeldingsformulier: esperanto-nederland.nl/studieweekend.

Subsidie mogelijk. Wil je graag deelnemen, maar is het te duur voor jou? Jongeren uit Nederland kunnen van Esperanto Nederland een tegemoetkoming in de kosten krijgen. Stuur dan een berichtje naar de organisatoren van het studieweekend.

Extra nacht in Krikkenhaar. Van zondagmiddag tot maandagmorgen kun je in het huisje 't Krikske overnachten. Neem contact op met Ineke.

Meer privacy in Op den Haar - Wil je tijdens het studieweekend meer privacy? Een eigen slaapkamer? Denk



dan eens aan het tweede huisje dat op het terrein staat. Het huisje heet *Op den Haar*. Er zijn twee slaapkamers. Als je dit iets lijkt neem dan rechtstreeks contact op met de beheerder van Krikkenhaar.

Van 22 t/m 24 mei 2026 organiseren we het volgende studieweekend. Dit is het pinksterweekend. Je kunt daar dan een extra nacht blijven in het 't Krikske. Het huisje Op den Haar kun je natuurlijk ook huren. Of de andere mogelijkheid is om gewoon een kamer te huren in het hoofdgebouw Krikkenhaar. Voor tarieven en zo kun je kijken op de website van de NIVON. Deze extra nacht regel je zelf en betaal je zelf ook! Nodig je Esperanto-vrienden uit voor dit lange weekend. Eerst studeren, en op zondagavond nog nagenieten en dan op 2^e pinksterdag een wandeling in de buurt maken. Of een fietstocht. Of gewoon lekker luieren.

Tot ziens in Krikkenhaar,

Lilian, Arjen-Sjoerd en Ineke

✉ studosemajnfino@esperanto-nederland.nl



PostNL
Port Betaald
Port Payé
Pays-Bas

Fenikso
Jar kolekto 30, n-ro 3
majo - junio 2025